

Krucenigmo centfelda

(Atentu: nur por bravuloj kaj progresintoj — kaj prefere ambaŭ). (Samtempe).

Nia krucenigmo ne estas precize krypta, sed tio ne signifas ke vi nepre facile solvos ĝin. Ĝi estas malkutima en tio, ke ĝi tute ne enhavas nigrajn aŭ neuzitajn kvadratojn. Unuflanke, vi ĝoju, ĉar ĝi havas ege malmultajn helpindikojn — nur 19. Malĝoju, ĉar la vortoj ne estas tro facilaj. Ili ĝenerale estas kunmetitaj vortoj. Eĉ forte kunmetitaj. Alie ne eblus atingi tiun mankon de vakaj kvadratoj. Por helpi vin iomete (nur iomete), ni indikas per ciferoj la longecon de la diversaj elementoj en la vorto, inkluzive de la finaĵoj. Ekzemple:

Estraraperoj = estr-ar-aper-oj = (4-2-4-2)

Cetere, ni defias al iu ajn krei similan cent-feldan krucenigmon sen vaka feldo en ajna alia lingvo ol Esperanto. Ni opinias tion malebla. Nur la ekstrema vortkunmeta kapablo de Esperanto permesas ion.

1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
11									
12									
13									
14									
15									
16									
17									
18									
19									

Horizontale:

1. Sturma tormento per manbatoj sur korpo. (5-4-1)
11. La komencon de provizado de necesaj iloj por iu tasko. (2-4-2-2)
12. Kun la kvalito de lirika poemo pri japana batalestro. (7-2-1)
13. Kolekton de maŝinoj. (6-2-2)
14. La haremo de la ĉef-veziro de Harun-el-Raŝid. (5-2-2-1)
15. Notis dirojn kaj decidojn dum kunsido. (8-2)
16. La krozado (2-3-1-3-1) aŭ: Promeno de malgranda marbirdo. (3-2-1-3-1)
17. Liston de nombroj, sumigo-preta. (5-3-2)
18. Tia oni estas progresanta rapide per ĉevalo. (5-2-2-1)
19. Traakva irad', ekzemple inter Nov-Jorko kaj Sanfrancisko. (4-1-3-2)

Vertikale:

1. Turmentu per multaj leteretoj, eble komputile. (5-4-1)
2. Daŭre okupas la centran merkatan lokon, ekskludante konkurantojn. (6-2-2)
3. Aparato por signali. (7-2-1)
4. La kvaliton esti ĝustatempa. (6-2-2)
5. De la speco de grupo de greke nomitaj tranpag-sistemoj. (3-4-1-3-1)
6. Pasivec-vekan. (5-3-2) *
7. Perceptanta okule iun en Bankoko? (3-2-1-3-1)
8. Iom post ioma energi-elĉerp' dum idologado. (4-1-3-2)
9. Sekretiga skribo severa. (4-5-1)
10. Daŭra bru' de mem-stimulado. (4-1-3-2)

* Esprimo famigita de brita politikisto, Geoffrey Howe, kiu mokis opoziciulojn ke pri iu temo ili "ekkuris tra la tuta lando, kirl-vekante pasivecon."